

DIA REGNO

DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (970) • 2025 •

Notre Dame 2024. Fotis Mariordo, CC BY-SA 4.0 ,Wikimedia Commons

ISSN 0167-9554



Notre Dame de Parizo estas re-inaŭgurita



Atentu!

La KELI-kongreso 2025 estas nuligita!

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe Cousson

✉ 26 rue de Pré-Venetet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
① +33 (0) 549468021; ✉ philippe.cousson@sfr.fr

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
① +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
① +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio
① +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Ĵaŭda diservo	3
La mortomeritaj pekoj – malnovaj kaj novaj	6
Biblia vorto kaj mia penso	11
Vivo de Willibrord ĉefepiskopo de Utreĥto	12
Notre Dame de Paris	19
Ho Maria, plena de grac'	21
Loius Braille – brajlo-skribado	22
Informetoj	23
Kotizoj por 2025	24

Redaktoroj vortoj

Karaj legantoj, kun peza koro mi skribas tiujn ĉi liniojn – **ĉijare ni nuligas nian kongreson!**

Ĝis nun tro malmultaj personoj aliĝis al la kongreso. Laŭ niaj antaŭaj spertoj, t.e. kiom da personoj kutime aliĝis je la sama tempo, ne troviĝas espero ke sufiĉa nombro aliĝu dum sekvontaj semajnoj/monatoj por ke ni povu mendi kongres-ejon kaj dormlokon. Do la estraro decidis nuligi la ĉijaran kongreson.

— * —

En nia malhela mondo, mi trovis malgrandan lumon kiam mi eksciis pri la granda pacifisto A.J.Muste (*1967). Iam raportisto demandis lin: “Ĉu vi vere pensas, ke vi ŝanĝos la politikojn de ĉi tiu lando starante sole ĉi tie nokte antaŭ la Blanka Domo kun kandelo?” A.J. Muste respondis mallaŭte: “Ho, mi ne faras tion por ŝanĝi la landon. Mi faras tion por ke la lando ne ŝanĝu min.”

Ni trovu inspiron kaj modelon de tiuj kiuj paŝis antaŭ ni kaj ni restu fidelaj al niaj kredo kaj bazaj valoroj.

Kaj pro tio rememoru, ke iam vi, nacioj laŭ la karno, nomataj la Necirkumcido ĉe la tiel nomata Cirkumcido, mane farita sur la karno — 12 ke vi estis tiam sen Kristo, fremdigitaj for de la komunumo de Izrael, kaj eksteruloj de la interligoj de la promeso, esperon ne havantaj kaj sen Dio en la mondo. 13 Sed nun en Kristo Jesuo vi, iam malproksimaj, proksimiĝis en la sango de Kristo. 14 Ĉar nia paco estas li, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la intermuron de disigo, 15 en sia karno neniiginte la malamon, la leĝon de ordonoj en dekretoj; por krei en si el la du unu novan homon, tiel farante pacon; 16 kaj por kunakordigi ambaŭ en unu korpo al Dio per la kruco, mortiginte per tio la malamon; 17 kaj li venis kaj predikis pacon al vi malproksimaj kaj al la proksimaj; 18 ĉar per li ni ambaŭ havas en unu Spirito alkondukon al la Patro.
Efesanoj 2:11-18

Karaj gefratoj en Kristo, la tri tekstoj, pri kiuj mi predikos hodiaŭ, venas el fontoj kiujn mi jam uzis. Unu venas el propono de la Unuiĝinta Metodista Eklezio por unu el liaj jaraj dimanĉoj de paco en justeco, kaj la alia venas el la alzata broŝuro de 1982.



Philippe Cousson dum kongreso en Vác

“Mia domo estos nomata preĝejo por ĉiuj popoloj” diras la Eternulo en Jesaja 56:7. Tiuj vortoj ofte troviĝas super la pordegoj aŭ sur la muro de sinagogoj. Ili aludas al la granda kunveno de la nacioj ĉe Ciono apud la popolo izraela.

La enkarниĝo kaj krucumigo de Jesuo Kristo aktualigas la profetaĵojn de la alveno de la Regno de Dio. Sed, en la Nova Testamento, tiu kuniĝo okazas jam ĉirkaŭ Jesuo Kristo, ne plu ĉirkaŭ Ciono.

Antaŭ Kristo, regis en la mondo fremdeco, senespero, distanco, disigo kaj malamo.

Kaj se tiel estas ankoraŭ en nia mondo malamo, malfido, timo al la alia, la proklamo de Kristo estas ke tia regado finiĝis. Se la rilatoj inter popoloj, ŝtatoj, nacioj estas ankoraŭ markitaj per inter-

muro de disiĝo, la venko estas de Kristo. En li estas la fino de malamo kaj la fino de leĝo kiu disigas. Kaj tio eblas tra la enkarniĝo kaj krucumigo de Kristo. Li tiel alportis la repacigon kun Dio.

Kvankam la popoloj ne akceptas tiun repacigon, la Eklezio estas de tiam unu korpo en paco. Vi scias ke tio ne komplete validas, ĉar tro ofte la Eklezio mistrafis la celon de Dio por ĝi, tio estas, atesti pri la paco de Dio. Kristo venis por efektivigi la Regnon de Dio per amo kaj sufero. Ni, Eklezio, ne devas celi la efektivigon de la Regno de Dio per forto kaj devigo.

La konvinko portata de tiu atesto kiu venas de la Evangelio estas : ĉiuj popoloj estas egalaj, ĉiuj popoloj kaj homoj estas vokitaj por la savo, al la savo. Neniu popolo estas pli alta, aŭ pli malalta.

Vi amu vian proksimulon kiel vin mem. Tio ne validas nur por la sam-uloj, sed ankaŭ por la malsam-uloj, ĉefe por la malsam-uloj. Kiam mi profitas de la malfortulo, de la malriĉulo, de la malsamulo, de la aliulo, mi tiam ĉiam troviĝas

antaŭ la vizaĝo de Kristo. Kaj tiu vizaĝo devus renversi mian emon por turni ĝin al amo.

Jesuo aperis malforta, malriĉa, malsama, alia, kaj tiel manifestis la Regnon de Dio, ne per forto, ne per riĉo, ne per samo, ne per memo.

Li venis kaj predikis pacon al la malproksimaj kaj al la proksimaj.

Tre fama estas la prediko sur la monto. Vi eble preskaŭ parkere konas la ben-dirojn de la komenco de la ĉapitro 5.

Kio tiu prediko estas ? Ĝi diras novan leĝon. Ĉu vere ? Mi preferas diri, novan legadon de la leĝo eterna de Dio.

Jesuo tie reprenas du regulojn, kaj malmuntas ilin, aŭ pli ĝuste malmuntas la tiaman legadon de ili.

Anstataŭ la venĝo, la reguligita venĝo, la proporcia venĝo, li iras pli profunden, de proporcia venĝo al nenia venĝo, al rezistado sen perforto, sen malamo, sed per amo, per servo, per sen-armil-igo de la ofendanto. Kaj tiu alvoko estas persona kaj kolektiva.

Tio sigelas la finon de venĝo, la finon

38 Vi aŭdis, ke estas dirite: Okulon pro okulo, kaj denton pro dento; 39 sed mi diras al vi: Ne rezistu al malbono; sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian. 40 Kaj se iu deziras procesi kontraŭ vi, por forpreni vian tunikon, lasu lin preni ankaŭ vian mantelon. 41 Kaj se iu devigas vin iri unu mejlon, iru kun li du. 42 Donu al tiu, kiu petas de vi; kaj ne deturnu vin de tiu, kiu deziras prunti de vi. 43 Vi aŭdis, ke estas dirite: Amu vian proksimulon, kaj malamu vian malamikon; 44 sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj; 45 por ke vi estu filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo; ĉar Li levigas Sian sunon sur la malbonulojn kaj bonulojn, kaj sendas pluvon sur la justulojn kaj la maljustulojn. 46 Ĉar se vi amas tiujn, kiuj amas vin, kian rekompencen vi havas? Ĉu ne tion saman faras eĉ la impostistoj? 47 Kaj se vi salutas nur sole viajn fratojn, kion ekstran vi faras? Ĉu ne tion saman faras eĉ la nacioj? 48 Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta.

Mateo 5:38-48

de la infera cirklo de la venĝo, la liberigon de la socia kaj persona kaptito de fiero kaj honoro. La respekto, la honoro devas iri al ĉiu.

Li poste komentas la gravan ordonon en Levidoj : amu vian proksimulon. Pli bone dirite, li renversas la malĝustan interpretadon kiu kondukis al la kutimo kompletigi la ordonon per dua frazparto: “kaj malamam viajn malamamikojn”. Tiu parto tute ne troviĝas en la Leĝo.

Li kutimas iri pli profunden, kaj same faris tion nun. “Amu viajn malamamikojn kaj preĝu por viaj persekutantoj.” La disĉiploj estas vokataj al amo al ĉiu, eĉ al persekutanto.

Tio estas paco. Tio estas justeco. Ne plu da venĝo. Ne plu da malamo.

Tamen, neni, krom Kristo mem, neni estas perfekta. Kaj tion bone scias la Izraelidoj, ankaŭ pri David.

Ni estas nun antaŭ la lastaj vortoj de la vivo de la reĝo David. Li klarigas kio estas la reguloj de lia vivo, la reguloj de lia regado. Ili baziĝas sur la justeco kaj la timo al Dio, la fido al Dio.

Ni, legantoj de la Biblio bone konscias ke David ne estis perfekta. Li plurfoje bezonis penti, kaj li tion faris, vere, ne ŝajne. En lia vivo ĉiam lia referenco estis la Leĝo de Dio, la justeco de Dio.

Fakte, li estis la reĝo. Sed li ne reĝis. Lia Sinjoro estis Dio. La reĝo David havis

reĝon super li. Estis leĝo super li, al kiu li submetiĝis.

Inter li kaj Dio estis persona rilato, kiu videblas en la diversaj psalmoj. Estis alianco inter Dio kaj David. Estis alianco inter la popolo kaj Dio. Tiu alianco postulas de ambaŭ flankoj fidelecon kaj respondecon. David foje mistrafis, sed li pentis. La popolo ofte mistrafis kaj nur malofte pentis. Dio ĉiam estis fidela. Sed la popolo suferis pro la konsekvencoj de siaj misagoj.

La fideleco al Dio kondukas al espero, al la lumo de la matena suno. Ofte noktoj estas malbonaj konsilantoj.

Ni ne plu vivas en tiu tempo de David kaj de lia popolo. Ni vivas post Kristo, kiu, posteulo de David, estis perfekta, justa kaj plene amanta, lume justa.

Ni, kristanoj, estas atestantoj de tiu lumo, de tiu espero, de la Dio de amo, de justeco kaj paco, kaj de Kristo.

Kiel David, ni estas vokataj al amo, al strebo por justeco kaj paco, apogitaj sur la firman aliancon de Dio, fidante lin por gvidi kaj subteni nin. Ni ne regu, sed atestu fidele kaj humile, juste kaj pace, kun fido, espero kaj amo.

Amen.

*3 La Dio de Izrael parolis,
Al mi diris la Roko de Izrael:
Justulo regas super homoj,
Li regas en timo antaŭ Dio.*

*4 Kaj li estas kiel la lumo de mateno,
Kiam leviĝas la suno,
De mateno sennuba,
Kiam post la pluvo
Elkreskas la verdaĵo el la tero.²
Samuel 23:3-4*

La mortomeritaj pekoj – malnovaj kaj novaj

Prelego dum kongreso en Domaszék 2022

Bazita sur libro de profesoro Stefan Einhorn

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

La “sep mortomeritaj pekoj” ne estas listigitaj en la Biblio, sed ili havas siajn radikojn tie. Ili troviĝas ĉie en la Skriboj, de Genezo ĝis la Libro de Revelacio. En la Evangelioj Jesuo revenas al tiuj pekoj denove kaj denove.

Frue ene de la Eklezio, du ĉefaj grupoj de pekoj komenciĝis esti distingataj: la mortomerita grupo (*mortalia*) kaj la pardonebla (*venialia*).

La mortomeritaj pekoj estis konsiderataj esti gravaj pekoj faritaj libervole kaj en plena scio pri sia signifo. La listo havis sian originon en la monaĥa movado en la frua kristana eklezio ĉirkaŭ la 4a jc. En la fermita mondo, kie monaĥoj, monaĥinoj kaj ermitoj vivis, estis ĉi tiuj sep pekoj, kiuj plej ofte igis ilin turmenti sin pro risiko de tento.

Je la fino de la 6a jc, papo Gregorio formulis la grandan liston de la sep pekoj kiel ni konas ĝin hodiaŭ.

- Fiero/orgojlo (*Superbia*)
- Envio (*Invidia*)
- Kolero (*Ira*)
- Maldiligento/pigro (*Acedia*)
- Avideco (*Avaritia*)
- Glutemeco (*Gula*)
- Volupto/malĉasteco (*Luxuria*)

Fiero/orgojlo: La malorda fiero implicas senton de supereco super aliaj, kaj prenas



Sankta Gregorio, 12 jc. /British Library

la nomon de orgojlo, kiu en la kristana doktrino estas la plej grava de la sep mortomeritaj pekoj. Arogantaj personoj ĉiam inklinas voli plenan atenton de aliaj personoj, sen zorgi pri la sentojn de tiuj personoj. Se iu ne iras laŭ la atendoj, tiam la orgojlulo inklinas ĉagreni kun siaj interparolantoj

Envio: estas la deziro havi ion, kion alia posedas. La envianto ofte sentas malĝojon kaj malamon kontraŭ iu, kiu posedas ion, kion oni mem malhavas. Oni ofte akuzas la kredantojn de egaligaj ideoj je envio. La kritikistoj asertas, ke deziro pri egaligo naskas envion, sed la envio ofte instigas enviantojn por pli bona, efika laboro por plibonigi sian vivon.

Kolero: Ĝia malo estas la kvieteco, la nekoleremo. Kolero povas aperi kiel pasia ĉagreno, furioza afekcio, kiuj povas sekvigigi nekontrolitajn agojn aŭ parolojn. Kolero tiel fariĝas mastro de la homo senkontrola.

Maldiligento/pigro: estas difinita kiel spirita aŭ emocia apatio, neglektante kion Dio diris, kaj estante kaj fizike kaj emocie neaktiva. Ĝi povas esti ankaŭ aŭ absoluta malakcepto aŭ simple senzorgo en la plenumado de la propraj devoj, ĉefe spiritaj, moralaj aŭ leĝaj.

Avideco: nepra aŭ troa ŝparemo ligita kun la malemo dividi valoraĵojn. Avarulo detenas sin de monelspezado, ankaŭ tiel malboniĝante sian propran vivnivelon.

Glutemeco: ekscesa kaj malŝpara konsumado de nutraĵoj aŭ trinkaĵoj. Unu el la sep gravegaj pekoj, ĉar nekonvena deziro de manĝaĵoj malpliigas la partojn de la malriĉuloj.

Volupto: estas uzata sinonime al malĉasteco aŭ promiskueco kaj difiniĝas “neleĝaj aŭ nur plezurdonaj seksrilatoj”

Tiuj mortomeritaj pekoj iĝis tre popularaj temoj dum la Mezepoko kaj multaj verkoj en la literaturo kaj la arto havas la sep mortomeritajn pekojn kiel temo aŭ tuŝas ilin en diversaj manieroj. La pekoj aperas, ekzemple, en *Purgatorio* de Dante en *LA DIA KOMEDIO* kaj en *RAKONTOJ DE CANTERBURY* de Chaucer, en la arto de Pieter Brueghel kaj en la plej multaj el la teologiaj verkoj de tiu tempo.

Mezepokaj teologoj faris la sep mortomeritajn pekojn la bazo de sia opinio pri homa konduto kaj homaj malfortoj, kaj la ideo ne estis tiel malĝusta.



Fiero de Hieronymus Bosch (1450–1516).



Envio de Hieronymus Bosch (1450–1516).



Kolero de Hieronymus Bosch (1450–1516).



Maldiligento de Hieronymus Bosch (1450–1516).



Avideco de Hieronymus Bosch (1450–1516).



Glutemo de Hieronymus Bosch (1450–1516).

Antaŭ la tempo de moderna psiko-
logio, oni tiatempe konstatis ke ekzistas
sep bazaj tendencoj en la individuo peki
aŭ ‘fari krimojn’:

- kontraŭ sia propra memo,
- kontraŭ sia kunhomo kaj
- kontraŭ Dio.

Lige al la pekoj, ĉiu peko havas sian
malon, virton, kun kiu oni foje povas
konfuzi ilin. Ofte la limo inter peko kaj
virto estas tre mallarĝa:

- Fiero – memrespekto
- Envio – justeco
- Kolero – justa indigno
- Maldiligento – singardemo
- Avideco – saĝo
- Glutemo – socieco
- Volupto – amo

La sep mortomeritaj pekoj ankaŭ estas
karakterizitaj per sia kapablo kaŭzi aliajn
pekojn. Envio povas, ekzemple, konduki
al ŝtelo kaj ĉantaĝo, kolero al murdo kaj
misuzo. Cedo al unu el la sep pekoj tiel
kondukas al amaso da aliaj pekoj.

Dum la klerismo de la 18a jarcento,
la temo de tiu sep mortomeritaj pekoj
perdis multe da sia populareco, kaj nun-
tempe ne multaj povas eĉ listigi ilin.

Laŭ studo en 2009 de la jezuitakade-
miulo Fr. R. Busa, la plej ofta mortiga
peko konfesita de viroj estas volupto kaj
la plej ofta mortiga peko konfesita de
virinoj estas fiero. La studo ne esploris ĉu
tiuj diferencoj estas kaŭzataj de fakta
nombro da malobedoj faritaj fare de ĉiu
sekso aŭ ĉu malsamaj komprenoj aŭ
opinioj pri kio devus esti konfesata kaŭzis
la observitan diferencon.



Volupto de Hieronymus Bosch (1450–1516).


Modernaj aŭtoroj ankaŭ emfazas, ke la mortomeritaj pekoj ne nur estas limigitaj al la individuo, sed ĉiu el ili ankaŭ kontribuas al detruaj sociaj fenomenoj:

- Fiero – diskriminacio
- Envio – terorismo
- Kolero – perforto kaj milito
- Maldiligento – indiferenteco al sufero
- Avideco – misuzo de publika konfido
- Glutemeco – drogomisuzo
- Volupteco – pornografio

En realeco oni tamen ne povas fari tian dividon inter diversaj pekoj. Ĉiu peko estas esence mortiga peko, ĉar ĝi apartigas la homon for de Dio kaj tiel malebligas al ni havi eternan vivon – sed ni ankaŭ povas esti pardonitaj de ĉiuj pekoj, se ni sincere pentas pri ili.

Ne troviĝas multe skribite pri la sep pekoj, se oni ne enkluzivas tion, kio originas el la frua eklezio kaj la mezepoko. Se oni tiampe pekis laŭ unu el la sep mortomeritaj pekoj, tiam oni estis certigita la eternecon en la fajroj de la infero.

Estas interese, ke en la preĝo de Coventry¹ oni trovas plurajn pardonpetojn kiuj rilatas al la sep mortomeritaj pekoj. Oni eĉ povus diri ke la preĝo de Coventry baziĝas sur la listo de la mortomeritaj pekoj, kaj ke tiu preĝo tiel ankaŭ konfirmas la ‘malnovan’ vidpunkton pri la homa karaktero. La preĝo petas Dion gardi nin, ke ni ne cedu al la tento.



*Ĉiuj estas pekitaj kaj mankas al ili gloro,
kiun ili devus havi ĉe Dio.*

La malamon, kiu dividas rason de raso,
popolon de popolo, klason de klaso,

Patro pardonu.

La akaparajn dezirojn de homoj kaj nacioj
por posedi, kio al ili ne apartenas,

Patro pardonu.

La avidon, kiu ekspluatas la laboron de la
homoj kaj dezertigas la teron,

Patro pardonu.

Nian envion pri la bonfarto kaj feliĉo de
aliaj,

Patro pardonu.

Nian indiferenton pri la mizero de
kaptitoj, senhejmluloj kaj rifuĝintoj,

Patro pardonu.

La volupt-amon, kiu pereigas la korpojn de
viroj, virinoj kaj infanoj,

Patro pardonu.

La orgojlon, kiu nin misgvidas fidi nin mem
pli ol Dion,

Patro pardonu.

*Estu bonfaraj unu al alia, bonkoraj,
pardonantaj unu al alia, kiel ankaŭ Dio en
Kristo pardonis al vi.*

Preĝo de Coventry, Adoru 867.

Novaj mortomeritaj pekoj

Ĉu ni nuntempe havas la saman opinion pri niaj plej malhelaj kvalitoj kiel en pasintaj tempoj? Aŭ ĉu ni hodiaŭ havas malsaman ideon pri kio estas la plej malbonaj flankoj de homoj? Kiuj proprajoj estas hodiaŭ konsiderataj esti la sep plej malbonaj pekoj — la novaj mortomeritaj pekoj.

Kial skribi libron pri la plej malbonaj flankoj de homoj? Parte estas por desegni la bildon de tio, kion ni opinias riproĉinda ĉe homo, kiujn pekulojn ni hodiaŭ opinias la plej grandaj.

Ni ofte neas, ke ni estas ‘kaptitaj’ per niaj malhelaj flankoj. Ankaŭ okazas ke ni projektas la malbonajn proprecojn sur nian mondon. Tiam ili povas soni jene: “Li estas avara diablo” aŭ “Ŝi estas kolera fivirino”. Kaj la plej malbona varianto estas verŝajne ĉi tiu: “Kial mi ĉiam troviĝas en laborejoj, kie ĉiuj aliaj estas idiotoj?” Se ni ne konscias, ke ni havas malhelajn flankojn en ni, ni fariĝas senhelpaj viktimoj de ĉi tiuj fortoj. Ni konstante stumblas sur ili sur nia vivo-vojaĝo. Sed se ni scias pri kaj akceptas niajn malbonajn flankojn, ni povas lerni trakti ilin.

Ene de ni, ni ĉiuj portas la semojn por ŝanĝo, kaj starante ĉe vojkruciĝo ni povas elekti kiun vojon ni iru. Sed por tio memkompreneble estas necesa. Kaj por tio estas ankaŭ necese ke ni estas malfermaj kaj memekzamenaj.

Krom por la individuo, la kono de eblaj malhelaj flankoj ĉe mi mem, estas grave por la grupoj kaj por la socio ĉar mankas plena konscio pri iliaj detruaj fortoj. Kaj foje ekzistas la kompreno, la

scio, sed tamen ne sufiĉas por ke okazu ŝanĝo. Ekzemplo estas la avideco, kiu igas la homon detrui la ekologian sistemon, aŭ la kolero kaj la emo ne paciĝi, kiu kondukas al konfliktoj kaj al milito.

Ni scias hodiaŭ el sciencaj studoj, ke homoj povas ŝanĝi se ili konsciiĝas pri siaj penso- kaj agadmanieroj. Tiam oni povas permesi la ŝanĝon influi nian karakteron, nian pensmanieron aŭ nian agadmanieron.

Multo estas simple gajnita se ni konsciiĝas pri niaj malhelaj flankoj kaj iliaj detruaj fortoj, ĉar ĝi ofte kreas emon ŝanĝiĝi. Ne estas facila procezo, ĉar postulas fortan instigon kaj laboron. Sed tiu barakto povas ankaŭ doni grandan profiton.

Esploro

La sveda kuracisto kaj profesoro Stefan Einhorn esploris, uzante enketilojn kaj profundajn intervjuojn, ĉe pli ol mil personoj, kiujn ili opinias, ke estas hodiaŭ la plej malbonaj trajtoj de homoj.



Bengt O Åradsson en Domaszék

Samajn metodojn li uzis por esplori la plej bonajn trajtojn de homoj.

La rezulto de tiu esploro mi prezentos en sekva(j) numero(j) de Dia Regno.

.. daŭrigota

cs

Notoj ———

1. Du preĝejoj, en Coventry kaj en Berlin, estis plene detruitaj per bomboj dum la dua mondmilito. En simbola akto de repaciĝo, homoj el Germanio kontribuis por novkonstrui la katedralon de Coventry, kaj inverse. En ambaŭ urboj tagmeze de ĉiu vendredo oni preĝas la samajn vortojn. Vidu Adoru 867 kaj Dia Regno 3/2017.

Karaj, certe sentema homo pli ol unufoje demandis sin: kio estas la plej grava en mia vivo; aŭ eble: kion plej gravan mi postlasos post mia foriro el tiu mondo? Oni ja vidas, ke la posedaĵoj okupas la plej altan rangon en la vivoj de la plejmultaj homoj. La nomoj de la plej riĉaj homoj de la mondo estas vaste konataj, kaj multaj “ordinaraj” homoj strebas por akiri almenaŭ malgrandan parton de tiaj riĉaĵoj. Tamen Jesuo mem diras al ni, kio gravas, kaj kio ne gravas, en la vivo de la homoj. Certe, mia foto neniam aperos sur la kovrilo de iu granda novaĵrevuo, mi neniam estos “Homo de la Jaro.” Tamen mi preferas eniri en la regnon de Dio kaj vivi eterne kun mia Savanto, ol posedi ĉiujn riĉojn de tiu ĉi mondo.

Jerald Veit

Luko 12:15

Kaj Jesuo diris al ili: Zorgu, kaj gardu vin kontraŭ ĉia avideco, ĉar la vivo de homo ne konsistas en la abundeco de liaj posedaĵoj.

Luko 18:18-25

Kaj unu reganto demandis al li, dirante: Bona Majstro, kion mi faru, por heredi eternan vivon? Kaj Jesuo diris al li: Kial vi nomas min bona? neniu estas bona krom Unu, nome Dio. Vi scias la ordonojn: Ne adultu; Ne mortigu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran ateston; Respektu vian patron kaj vian patrinon. Kaj li diris: Ĉion tion mi observis detempe de mia juneco. Kaj Jesuo, aŭdinte, diris al li: Ankoraŭ unu mankon vi havas: vendu ĉion, kion vi posedas, kaj disdonu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo; kaj venu, sekvu min. Sed aŭdinte tion, li fariĝis tre malĝoja; ĉar li estis tre riĉa. Kaj Jesuo, lin rigardante, diris: Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio! Ĉar estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio.

Vivo de Willibrord ĉefepiskopo de Utreĥto*

Verkis Alkuino kaj Thiofrid

El la latina tradukis Gerrit BERVELING, NL

Resumo

Willibrord, la apostolo de la Frisoj, estas unu el la anglosaksaj misiistoj de la frua Mezepoko, kiuj laboris por kristanigi Eŭropon. Dum duona jarcento (690-739) la evangelizanto el Northumbrio laboris por inter Rejno kaj Weser diskonigi la evangelion, kontraŭi nekredon kaj miskredojn, konstrui preĝejojn kaj – same servante al Romo kiel al Frankaj regantoj – konverti paganojn Germanajn, por transdoni siajn vivlaboron, gloron kaj meritojn al sia kunbatalanto, la populara Bonifacio. La vivon kaj agadon Willibrord, kiu estas ankaŭ konata kiel fondinto de Klostro Eĥternaĥ (Luksemburgio) kaj Ĉefepiskopo de Utreĥto (Nederlando), verkis Alkuin, la instruinto de Karolo la Granda. Ankaŭ la abato Thiofrid verkis pri Willibrord.

Antaŭparolo

Al la plej eminenta kaj laŭdinda Sinjoro Ĉefepiskopo Beornrad prezentas siajn salutojn la humila servisto Alkuin.

Kiam la leteron de via alteco ni ricevis, en kiu vi esprimis vian dediĉon al la Sinjoro kaj vian daŭran atenton pri Liaj ordonoj, mi devas konfesi, ke mi grande ekĝojis. Sed tamen mi ja neniamaniere min kredas kapabla por via intenco, ĉar mi ne povas apogi je stilismaj kapabloj, por tion realigi, kion vi taskigis al mi, kaj se min ne pelus la amo, kiu kutimas nei nenion, tiam mi ne kuraĝus ekpreni tiun ĉi taskon, kiu superas miajn simplajn kapablojn.

Tamen laŭ via peto, helpate de Dia graco kaj ĉar favoris tion la plej sankta Patro Willibrord, kies vivon, kutimojn kaj miraklojn vi min petis piafervore priskribi,

vianj indikojn, sankta Patro, mi obeis kaj du libretojn mi verkis¹ – unu en proza rakont-stilo, kiu, se al via saĝeco ŝajnas inde, en la preĝejo publike povas esti voĉlegata al la fratoj; la alia en poezia metriko, kiu nur en dormĉambra sekreto inter viaj lernantoj devus resti remaĉata.

Ambaŭ siatempe estis diktataj inter la dumtagaj devoj ĉe kaŝaj noktaj okupiĝoj, kaj des pli bezonas vian defendon, ju malpli ili estis poluritaj de la aŭtoro mem. Mia tasko estis ne neglekti la aŭtoritaton de la ordonanto; la via estas ŝirmi la senspertan de la obeanto.

Mi ankaŭ aldonis al la unua libreto unu predikon², pri kiu mi esperas, ke ĝi meritas esti eldirata de via honorinda buŝo al la popolo.

Post la dua libreto mi aldonis elegion pri la honorinda viro Wilgis, la patro de

la plej sankta episkopo Willibrord, kies korpo ripozas en eta monaĥa ĉelo ĉe la maro, kiun mi, kvankam neinda, kun la graco de Dio, kiel legitiman posedaĵon prizorgas.

Sed ĉio, kion mi diktis, ĉu en prozo, ĉu en metrika formo, atendas la juĝon de via sankteco, ĉu estas inde transdoni ĝin al la posteuloj, aŭ ĉu ĝi estu forigita per la malmola pumiko; ĉar nur post kiam vian prijuĝon ĝi eltenis, ĝi povos aperi antaŭ la publiko.

Ĉapitro 1 — Pri la patro Wilgis

Estis sur la insulo Britanio, en la provinco Northumbrio³, familiopatro de Saksa deveno, nomata Wilgis, kiu kun sia edzino kaj sia tuta familio, kiel poste diskoniĝis per mirakloj, vivis pie kaj kristane.

Ĉar post kiam sian ĉi-teran vivstilon li cedis, li elektis la monaĥan vivmanieron kaj baldaŭ poste, kiam en li kreskis la deziro plispiritualigi sian vivstilon, en flama idealismo li sin dediĉis al la ermita vivado en la promontoro, kiun ĉirkaŭfluas la Oceano kaj la rivero Humbro. Tie longtempe Dion li servis en eta preĝejeto, kiun li dediĉis al la sankta apostolo Andreo, per fastado, preĝoj kaj vigiloj, tiel ke per mirakloj li koniĝis kaj famiĝis lia nomo.

Kaj li ne hezitis per alloga predikado de la Parolo de Dio admoni la al la alfluantajn amasojn. Sed ĉe la reĝo kaj la



Rijksmuseum, Antwerpen

princoj de tiu popolo li atingis tian honorecon, ke ili transdonis al li kelkajn terenojn kiel nerevokeblajn donacojn por konstruado de sanktejo. Tie la sankta Patro kunigis modestan, sed honorindan komunumon da servistoj de Dio; kaj tie, post diversaj bataloj de sankta laboro de Dio kronite, li trovis sian lastan ripozejon, kaj liaj posteuloj konservis tiun posedaĵon en sia sankta tradicio ĝis la hodiaŭa tago.

Laŭ meritoj kaj laŭ rango ilia malsuperulo, en legitima tradicio mi transprenis tiun preĝejon por konservado, mi, kiu laŭ via instigo, honorinda Patro Beornrad, verkis ĉi tiun biografion pri la sankta Patro kaj saĝa Instruisto

Willibrord. Pro la Di-donita graco, vi ja ekagis kiel plej inda heredanto de ĉi tiu sankta Patro – laŭ valoro de via sankta ofico samkiel koncerne la kultadon de la sanktaj lokoj, kiuj estis konstruitaj honore al Dio.

Ĉapitro 2 — La vizio

Por nun rekonstrui la antaŭhistorion de la naskiĝo de la sankta Patro Willibrord kaj baldaŭ la antaŭsignojn de lia Dia elektiĝo jam en utero de la patrino, mi nun reiru al la punkto, de kie mi ekis.

Ĉar kiel la antaŭiranto de nia Sinjoro Jesuo, la sankta Johano Baptisto, de la patrina utero jam estis sanktigita, devenante de plej sanktaj gepatroj, kiel rakontas la evangelio, kvazaŭ lumportanto antaŭiranta Kriston, la Sunon, por al multaj homoj porti la saviĝon –⁴, tiel ankaŭ la sankta Willibrord naskiĝis sava kaj bona por sennombraj homoj kaj, kiel klare montriĝas, estis infano de piaj gepatroj.

Ĉar la honorinda Wilgis, pri kiu jam mallonge ni parolis, laŭ Dia providenco nur tial eniris nupton, por ke je beno al multaj popoloj diveni el li tia infano.

Tial lia edzino, la estonta patrino de la sankta Patro Willibrord, en noktomeza senbruo dumdorme vidis ĉielan aperaĵon. Ŝajnis al ŝi, kvazaŭ je la firmamento Novlunon ŝi ekvidas, kiu kreskis, ĝis ĝi impresis kvazaŭ Plenluno. Dum tiun ŝi rigardis pli atente, subite en ŝian buŝon ĝi enfalis; apenaŭ ĝin ŝi englutis, kaj jen ŝia interno brilegis je granda gloro. Kiam timplena ŝi vekigis, ĉi sonĝon ŝi rakontis al pia pastro; kaj kiam tiu informiĝis, ĉu tiunokte, kiam ĉi sonĝon ŝi vidis, laŭ

kutima maniero kun sia edzo si sekskuniĝis, kaj kiam tion ŝi jesis, li jene respondis:

“La Luno, kiu antaŭ viaj okuloj el etaĵo diskreskis ĝis grandaĵo, estas la filo, kiun tiunokte viautere vi koncipis. Per la lumo de la Vero la erarojn de l’ mallumo li disrompos kaj, kien ajn li atingos, ĉirkaŭate de la aŭro de la lumo ĉiela, la plenon de sia perfekteco li montros, kaj per la brilo de sia karaktero la atenton de multaj li direktos al si.”

Al tiu ĉi sonĝo kaj ties klarigo tuj sekvis la efektiviĝo.

Ĉapitro 3 — Nova Samuel

Okazis post forpaso de tagoj, la virino naskis filon, kaj kiam en la sankta fonto de la bapto li renaskiĝis, la patro donis al li la nomon Willibrord, kaj post kiam li ne plu trinkis la patrinan lakton, tuj lia patro transdonis lin⁵ al la religiaj patroj de la klostro Ripon⁶ por eduki lin en la kristana doktrino kaj la sanktaj skriboj – kun la intenco, ke la ankoraŭ neformita aĝo per la tieaj ekzercoj fortiĝu, se li vidus nur honorindaĵojn kaj aŭdus nur sanktaĵojn.

La Dia graco ebligis al li, ke de infanaĝo spirite li kresku kaj karaktere li firmiĝu, kiom eblas je tia aĝo, tiel ke oni povus kredi, ke en nia epoko naskiĝis nova Samuel, pri kiu estis skrite: “La knabo Samuel kreskis kaj plaĉis al Dio kaj homoj”⁷.

Tie, en la menciita klostro, la knabo, kiu estis destinita por beno al multaj, ricevis la tonsuron de la klerikoj kaj per pia voto sin faris monaĥo; kune kun la ceteraj samaĝuloj de ĉi monaĥejo li estis edukita. Antaŭ neniu li cedis en

entuziasmo, neniu lin superis en la necesa humilo kaj de neniu li estis venkita en sindediĉo al la Skriboj.

Sed la knabo ĉiutage tiel progresis, ke kun la matureco de sia karaktero sian junan aĝon li pli superis: kaj li fariĝis adolta en sia komprenpablo, dum fizike li restis ankoraŭ tre fragila.

Ĉapitro 4 — Religia pilgrimado

Dum ĉi benata junulo do avancis en la sankta erudicio kaj en ĉia sobreco kaj plej feliĉa mora honesto, li ekflamis de profunda deziro al sanktigita vivado kaj de sopiro al Pilgrimado.

Li aŭdis, ke en Irlando la kristana instruo atingis speciale altan nivelon, kaj lin instigis krome, ke la famo rakontis pri la vivovojo de kelkaj sanktaj viroj, precipe la sankta patro kaj episkopo Ecbert, kiu ricevis la kromnomon ‘la Sanktulo’, kaj la reverenda pastro Wicbert, kiuj ambaŭ pro amo al la ĉiela Patrujo forlasis hejmon, patrujon kaj parencojn por migri al Irlando, kie longe diste de ĉi-teraj devoj kaj en plena



Willibrord predikas por la fiŝistoj.
George Sturm (1855–1923)

sindediĉo al Dio ili rikoltis la plej dolĉajn fruktojn de Dia meditado.

Kun la intenco, imiti ties fido-forton, kaj kun la beno de sia abato kaj de siaj klostrofratoj, la Dibenata junulo rapida paŝe migris al Irlando, kie kun la menciitaj patroj en amikeco li kuniĝis, por kiel saĝa eta abelo el la kontakto kun ili elsuĉi la nektarajn fruktojn de la fido kaj en la abelujo de sia koro konstrui la plej dolĉajn teksaĵojn de noblaj virtoj.

Tie dek du jarojn estis edukata de eminentaj instruistoj de la Kristana Religio kaj de la Sankta Skribo la estonta misiisto de sennombraj popoloj, ĝis li elkriskis je perfekta viro kaj la aĝo de matureco en Kristo.

Ĉapitro 5 — Vivo aktiva

Je la aĝo de 33 jaroj ĉe la eminenta viro riviĝis deinterne ĉiam kreskanta fido-flamo, tiel ke al li ŝajnis nekontentige, nur pro sia propra persono esti ŝvitinta por sanktiĝo, se ne ankaŭ por aliaj li estus profita en la predikado de la vero. Li aŭdis, ke en nordaj regionoj estas ja granda rikolto, sed malmultaj laborantoj⁸.

Sed por ke plenumiĝu laŭ Dia ordigo la vero de sonĝo, kiun iam havis pri li lia patrino – kiel ŝi atestis – en plena konscio pri sia volo, kvankam ankoraŭ ne sciante pri Dia ordigo, al tiuj regionoj navigi li pensis kaj, se estus Dia deziro, prilumi per la brilo de l’ helega evangelio la popolojn, kiuj tie rigidiĝis per longdaŭra malfido, li surŝipe kunprenis kun si dek unu fratojn⁹, kiuj havis la saman fido-fervoron, kiel li mem.

Kelkaj el ili poste, dank’ al sia obstino ĉe la predikado de la evangelio, estis

kronitaj per la martir-morto, dum aliaj, kiuj ricevis la ordinon de la episkopeco post laboro ĉe la sankta predikado, mortis en paco.

Tiu viro de Dio, kiel ni rakontis, ŝipveturis, ĝis siajn velojn kun prospera vento li demetis ĉe la buŝo de la rivero Rejno; tie sur la bonvena sektero ili sin refreŝigis, kaj baldaŭ la kastelon Utreĥt ili atingis, kiu kuŝas tuj ĉe la bordo de la ricevo; kaj tie post mallonga tempo pro Dia graco kaj ĉar la Parolo de la kredo kreskis, la sankta Willibrord ekhavis la Seĝon de sia Episkopejo.

Sed ĉar la tribo de la Frisoj, en kies regiono tiu kastelo estis konstruita, kun sia Reĝo Radbod ankoraŭ kuŝis en la malpuro de paganaj moroj, la homo de Dio decidis rapidi en la Regnon de l' Frankoj kaj aliri al ilia duko Pipino¹⁰, viro brava, kiu famis pro siaj sukcesoj kaj kiu karaktere estis honesta.

Ĉi tiu akceptis lin kun ĉia honoro, sed ne volis, ke li aŭ lia popolo perdu tian gloran klerulon. Li do indikis al li konvenan terenon interne de siaj limoj, kie la dornojn de la idoladoro radikale li ekstermu kaj la purajn semojn de l' parolo de Dio li riĉe disŝutu, por ke plenumiĝu la diroj de la Profetoj: “Plugu al vi novan plugokampon, kaj ne semu inter domaĵo”¹¹.

Ĉapitro 6 — Kion volis Pipino

Kiam la Viro de Dio, dum diligente tra la unuopajn lokojn li kuris, plenumis la deziratan laboron de la Evangelizado, kaj kiam la Semo de la Vivo, priverŝita de l' roso de la Dia Graco, pro ilia predikado suprenŝprucis ĉie sur la kamparoj de l'

korjoj de multaj, la menciita Franko-duko ĝojis pro lia sankta engaĝiĝo kaj pri la sankta disvastiĝo de l' Parolo de Dio. Kun la celo atingi ankoraŭ pli grandan rezulton, en prudenta planado li volis sendi lin al Romo, por ke la Papo Sergio¹², la plej alta spirita aŭtoritatulo de tiu epoko, oficiale levu lin al honorplena episkopa rango: ricevinte la apostolan benon kaj elsendon, li des pli plenfide estu forsendita kaj fortigita por reiri al sia misiada laboro, laŭ la diro de la apostolo:

“Kaj kiel oni heroldu, se oni ne estas sendita?”¹³

Kiam la Homon de Dio al tio li provis instigi, tiu unue kontraŭis kaj tenis sin je sia starpunkto, ke la honoron de tiel alta ofico li ne meritas. Elnombrinte la kriteriojn de la Apostola sanktiĝo, li deklaris, ke la postulojn de tiu katalogo da etikaj kvalifikoj li ne kapablas plenumi, kiun la mirinda Apostolo de la Paganaj elnombris, kiam sian spiritan filon Timoteo li instruis pri la episkopa ordino.¹⁴

Sed la Duko en religia senco konsilis je tio, kion la Viro de Dio pro humilo kontraŭis. Fine venkite de ĉies instigoj kaj, kio diras ankoraŭ pli, pelite de l' Dia Ordigo, li konsentis – ne laste, ĉar li volis submetiĝi al la konsilo de la plimulto prefere ol trapeli sian propran necedemon. Kaj tiel kun respektinda delegitaro kaj donacoj, kiuj decas al apostola aŭtoritato, li estis sendita al Romo.

Ĉapitro 7 — Ĉefepiskopo 'Klemento'

Sed la kvaran tagon antaŭ lia alveno tien la Sankta Patro dumdorme estis avertita

de anĝelo, ke tiun li akceptu kun la plej alta honoro, kaj ke neniun el ties deziroj li malakceptu, ĉar li estas la onta lumportanto por multaj animoj, kiun Dio elektis kaj kiu tiucele venis, ke de li la honoron li ricevu de la plej alta pastreco, kaj ke nenio al li estu negata, kion li petus.

Certigita de tiu admono, li akceptis lin kun granda ĝojo kaj multa honoro; kaj tuj kiam li rekonis en li la fajron de la Fido, la humilan Sindediĉon kaj la plenan de Saĝo, je antaŭfiksita dato, kiam la popolo alfluis kaj la honorindaj pastroj por asistado estis invititaj, publike li ordinis lin en la Preĝejo de l' Princo de la Apostoloj Petro¹⁵ kiel Ĉefepiskopon. Kaj post la ordino li donis al li la nomon "Klemento", vestis lin en la pastra kostumo kun la sankta paliumo de lia ofico, same kun la mantelo de Aaron¹⁶, kaj firmigis lin per la gloro de lia aspekto, kaj kiom li deziris aŭ petis, li cedis al li – ĉu en ŝirmado per relikvoj de sanktuloj, ĉu en ekleziaj aferoj, tutkore kaj ĝoje. Kaj fortigitan de la beno, riĉigitan de bonfaraj ordonoj li resendis lin ree al la Misiada tasko.

Ĉapitro 8 — Sendita de Pipino

Post ricevo de l' beno de la Apostola aŭtoritato, kiel engaĝita Predikanto de l' Parolo de Dio plenkonfide li reiris al la menciita Duko de l' Frankoj.

Tiu bonvenigis lin kun plej alta honoro kaj dank' al sia Ofico li indikis al li la taskon evangelizi, precipe tamen en la plej nordaj partoj de sia regno, kie ĝis tiam pro rareco de instruoj aŭ pro la duro de la loĝantaro la flamo de la Fido ankoraŭ malmulte ekflamis. Tien la

Homo de Dio en tiuj regionoj do disŝutis la semojn de l' vivo, ju pli li travidis la neceson forpeli la malnovan malsaton de l' sencio.

Kian frukton kun helpo de la Dia Graco en tiuj regionoj li kreskigis, atestas ĝis nun la popoloj ĉie en la urboj, vilaĝoj kaj kasteloj, kiujn per sia Dibenata predikado li kondukis al adorado de l' unusola kaj ĉiopova Dio. Atestas ĝin same la eklezioj, kiujn en la diversaj lokoj li konstruis; atestas ĝin same la komunumoj de la Servantoj de Dio, kiujn en la kelkaj lokoj li kunigis.

... daŭrigota

Notoj —————

* La tuta teksto ankaŭ troviĝas ĉe fontoj.net

1. Nur la unua enestas en ĉi eldono.
2. Mankas en ĉi eldono.
3. Northumbrio sur la Britaj insuloj havis duoble gravan rolon: unue sub reĝo Ecgrith, kiu batis la Piktojn, inter la Heptarĥio (Sep-reĝaro) ĝi havis gvidan rolon, kiun tamen post lia morto en 685 ĉe Mercia ĝi perdis. Poste sub lia posteulo Aldfrith, kiu, edukite laŭ Ira kutimo, subtenis Monaĥejon-konstruadon kaj -bibliotekojn, kio rezultis en serion da gravuloj: krom Willibrord ankaŭ Ecbert, la abato de Melfont, Beda Venerabilis kaj ankaŭ Alkuin mem.
4. Laŭ Luko 1:15. 5. La transdono de neplenaĝuloj – Willibrord tiutempe estis ĉ 6-jara – jam en La Regulo de Benedikto (ĉ 59) estis detale organizita. Dum en Frua Mezepoko tiu 'transdono' estis ĝenerale akceptita –

- inter la plej famaj apud Willibrord
Bonifacius ni menci pri Notker
Balbulus de St. Gallen kaj Hermann
der Lahme von der Reichenau—, poste
estiĝis kreskanta kritiko kontraŭ ĝi;
Ĥrabanus Maurus sin vidis devigita,
per verkaĵo defendi ĝin. Per la
reformmovado de Kluny tiu ĉi kutimo
malaperis finfine.
6. La Klostro Ripon estis fondita de
Wilfrid (634-710) kiel fondaĵo de la
northumbria reĝo Alfrith. Wilfrid
samtempe estis abato de la Klostro
Ripon kaj ĉefepiskopo de York. Li ege
influis la junan Willibrord. La rekta
ligiteco al Romo devenas de Wilfrid —
same poste Willibrord.
 7. 1 Samuel 2:26.
 8. Laŭ Mateo 9:37-38.
 9. Por simboloj la 12 apostolojn?
 10. Pipino la Meza (640-714) post batalo
ĉe Tertry ĉe la rivero Somme efektive
regis la regnon de la Frankoj, kvankam
oficiale li rekonis la “reĝon” Theuderik
3an; sed la Arnulfingroj — lia familio —
fakte regis. Li protektis la misiadon de
Willibrord.
 11. Jeremia 4,3.
 12. Evidente el la vidpunkto de Alkuin, kiu
loĝis en Akeno
 13. Romanoj 10:15.
 14. 1 Timoteo 3:1-7.
 15. Laŭ Beda tio okazis tamen en la
Preĝejo de Sankta Cecilia; okazis
dimanĉe 21 nov 695.
 16. Eliro 29:5

✞

Kelkaj gravaj eventoj en la historio de Notre Dame

- | | |
|---|--|
| 1163: Episkopo Maurice de Sully komencas konstruadon de la katedralo. | 1844-1864: Ampleksa restaŭrigo. |
| 1220–1230: Ekkonstruado de la sonorilturoj. | 1944: Festo de la liberigo de Parizo. |
| 1699: Grava renovigo komenciĝas. | 1945: Festo de la fino de la Dua Mondmilito. |
| 1790: Dum la Franca Revolucio, ĉiuj bronzo, plumbo kaj aliaj valoraj metaloj estas prenitaj de la eklezio por esti fandata. | 1963: Ampleksa purigado de la ekstero de la katedralo estas ordonita fare de ministro André Malraux. |
| 1801–1802: Napoleon I resendas la uzon de Notre Dame al la Romkatolika Eklezio. | 1980, 1997: Vizito de papo Johano Paŭlo II. |
| 1804: Napoleono I kroniĝas imperiestro en Notre Dame. | 2008: Vizito de papo Benedikto XVI. |
| | 2019: La 15an de aprilo, granda fajro. |
| | 2024: Remalfermo de Notre Dame post ampleksa reconstruo. |

Notre Dame de Paris – Nia Sinjorino de Parizo

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

Printempe 2019 nia familio havis gravan datrevenon kaj jam frue ni planis fari mallongan vojaĝon al Parizo. Kompreneble ni pripensis, kiujn vidindaĵojn ni vizitu dum niaj tagoj. Unu tagon, kelkaj semajnoj antaŭ nia vojaĝo, aŭtoveturante ni aŭdis la novaĵprogramon kiam ili raportis pri la incendio en Notre Dame de Parizo. Nia filo ekploris, ĉar tio signifis, ke ni ne povus viziti tiun preĝejon. Granda perdo!

Mi supozas ke neniu, kredanto aŭ ne-kredanto, protestanto aŭ katoliko, franco aŭ ne-franco estis ne ne-tuŝita de tiu katastrofo. Notre Dame ja estas granda parto de nia komuna historio kultura, arkitektura aŭ/kaj religia.

Nia ‘Sinjorino de Parizo’ estas la romkatolika katedralo de Parizo. Ĝi situas sur la insulo Cité meze de la urbo. La konstruado komenciĝis en 1163 kaj finiĝis en 1345. Ĝi estas unu el la unuaj grandaj gotikstilaj katedraloj, kaj servis kiel modelo por multaj katedraloj kaj

preĝejoj en Francio kaj Eŭropo. Ĝin tute restaŭris la fama franca arkitekto Eugène Viollet-le-Duc dum la 19a jarcento (1845–1864).

Beletre ĝi estis fona ‘scenejo’ de la fama romano verkita de Victor Hugo, NOTRE-DAME DE PARIS, kun ties rolantoj Quasimodo kaj Esmeralda.

La 15an de aprilo 2019 la katedralon grave difektis incendio, la spajro kolapsis, la ligna ĉarpentaĵo (kun plumba tegmento) detruigis.

Post rekorda rekonstruo, la preĝejo estis solene re-inaŭgurita en decembro 2024 kun pluraj ĉeestantaj ŝtatestroj.

Pro pluvo kaj malbona vetero dum la tago de la ceremonio la programo estis ŝanĝita. La tuta ceremonio nun okazis en la katedralo, inkluzive la parolado, kiun prezidento Macron planis doni antaŭ la katedralo, sed nun donis interne. Neniu franca prezidento iam antaŭe parolis en Notre Dame.

☪



Notre Dame de Parizo en 2017 /Fotis Ali Sabbagh. CC0, commons.wikimedia.org

Nova spajro 2024
/Fotis
Misterunknown24, CC
BY 4.0, commons.
wikimedia.org



Malnova spajro,
de 19 jc. /Fotita
2019 de Jebulon,
CC0, commons.
wikimedia.org



Incendio, la 15an de aprilo 2019 /Fotis Antoninnnnn,
CC BY-SA 4.0 Wikimedia Commons

Novembro 2019
/Fotis
Qwertzu111111,
CC BY-SA 4.0,
commons.
wikimedia.org



La mond-fama katedralo ‘Notre Dame’ en Parizo, parte detruita 2019-04-15 per incendio, rekonstruita ene de malpli ol ses jaroj, estas denove inaŭgurita 2024-12-07.

Okaze de ĉi soleno oni kantis al Maria la kanton ”Vierge Sainte, Dieu t'a choisie”, evidente kun la kutima teksto (ĉar plejparte parkere).

Tio instigis min verki novan tekston (vidu apudan paĝon), ankaŭ sub la influo de la abomeninda agres-milito de Putino kontraŭ Ukrainujo kaj la kruelaj ŝemidaj frat-militoj en Proksima Oriento.

Albrecht Kronenberger

Ho Maria, plena de grac'

Notre Dame

M: Vierge Sainte, Dieu t'a choisie



1. Ho Ma - ri - a, ple - na de grac'!
2. Jen mi - li - tas hom' kon-traŭ hom'.
3. Pac - i - de - ojn do - nu al ni.




Ni - a Dam', Re - ĝin' de l' pac'!
Fa - las kirk', ven - dej' kaj dom'.
Nin al pa - co spro - nu vi.



Vi - a pre - ĝej' post faj - ro kaj flam'
En ru - i - niĝ', en ĉi - a mi - zer'
No - ve sta - ri - ĝu pa - co kaj am'



no - ve ek - bri - las, la No - tre Dame.
es - tu, Ma - ri - a, kon - sol', es - per'.
ki - el la bri - lo de l' No - tre Dame.



1.-3. A - ve, A - ve, A - ve, Ma - ri - a.

Louis Braille kaj brajlo-skribado

El Vikipedio


La 4an de januaro, la Brajlo-tago estas festata tutmonde. Estas tago bone festinda. Malgraŭ ĉio, Brajlo estas la sola alternativo por efektive legi literojn kaj skribadon por tiuj, kiuj ne povas legi nigre-presitan presaĵon per siaj okuloj.

En 2025, ĉie estos festate ke pasis 200 jaroj depost kiam Brajlo-skribado estis kreita fare de Louis Braille.

 Louis BRAILLE naskiĝis en Coupvray apud Parizo. Kiel eta infano li pro akcidento blindiĝis. La ege inteligenta kaj scivolema knabo pro tio ne perdis sian kuraĝon; la sola afero, kiu tamen daŭre afliktis lin, estis la fakto, ke li povis ĝui literaturon nur aŭskultante voĉlegadon.

Kiel lernanto en Pariza blindullernejo Braille eksciis pri tiel nomata nokta skribo inventita de la artileria kapitano Charles Barbier por la transdono de militaraĵ mesaĝoj dum mallumo. La principo de tia palpebla skribo estis tute bona, sed por la praktika uzo ĝi estis tro komplika. La juna Braille do ŝanĝis la silaban sistemon al litera kaj reduktis la nombron de punktoj po signo de dek du al ses. En 1825 lia skribo estis preta kaj en 1839 Braille kreis muziknotojn laŭ la sama sistemo.

Kvankam la skribo montriĝis simpla kaj facile lernebla, ĝi longtempe estis forte kritikata. La finan venkon de sia invento Braille, kiu en 1852 mortis de tuberkulozo, ne plu povis sperti.



Esperanta Brajla Alfabeto



En biblia muzeo en Strasburgo 2015.
Mats Landfors legas brajlan biblion.

La skribo de Braille, laŭ la inventinto nomata “Brajlo”, ankaŭ ekzistas en esperanta versio. La Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) zorgas pri la kreo kaj disvastigo de brajlaj publikaĵoj en Esperanto.

En la jaro 2009 Internacia Ekzamena Komisiono de UEA kaj ILEI proponis regularon por ekzamensesioj por blinduloj. Tio okazis en la jubilea jaro 200 jarojn post la naskiĝo de Braille. Samjare tiu regularo estis aprobita de la du Komitatoj de UEA kaj de ILEI.

✎

Informetoj



En Révfölöp 2019

Sieglinde Stamm

† 24.8.1938 — † 7.1.2025

Nia kara membro forlasis nian teran kunestadon. En 1963 en Graz, Aŭstrio, ŝi partoprenis unuafoje KELI-kongreson kaj poste la plej multajn ĝis ŝia lasta partopreno en 2019 en Révfölöp, Hungario.

Batalu la bonan batalon de la fido, kaj ektenu la eternan vivon, al kiu vi estas vokita kaj konfesis la bonan konfeson antaŭ multaj atestantoj. 1Tim 6.12



Josef Pokorný en 2020

JOSEF POKORNÝ

† 1.2.1920 — † 16.1.2025

Frato Josef Pokorný mortis 2 semajnojn antaŭ sia 105-a naskiĝtago en la domo de pensiuloj en Hořice v Podkrkonoší. Li estis longjara keliano, lian nomon mi trovis jam en KELI-adresaro el jaro 1966.

Pavel Polnický

Membrigo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno – Kotizoj 2025

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI,	16,00 EUR
pagante tra libroservo	18,00 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni Dia Regno-n, turnu vin al la kasisto de KELI	10,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n)	Donaco

Pagmanieroj (se ne estas aparte indikitaj sube):

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
3. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciui: por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64
4. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR 76 1009 6182 4800 0368 7480 104
5. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
☎ +36 302 000 306; ✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Notu: Ŝanĝu <ĉe> al @

Ĉeĥa Respubliko 450 CZK
Sekce křesťanských esperantistů ČES
Prezidanto: Pavel Polnický,
Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
☎ +420 723 672 335,
✉ polnickypavel@seznam.cz

Francio 25 EUR
CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
“Franca Evangelia Esperanto-Ligo
(FEEL)”.
Kasisto: Samuel Gaillard,
5 rue Maurice Ravel,
FR-63800 Courmon d’Auvergne
☎ +33 (0)4 73 84 31 31,
✉ samuel.gaillard@ac-clermont.fr

Germanio 25 EUR
Esperanto-Liga für Christen in
Deutschland e.V.
Banko: Evangelische Bank EG
Kassel, Kiel
IBAN: DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC: GENODEF1EK1
Kasisto: d-ro Rudolf Fischer,
Gustav-Adolf-Str. 2a,
D-48356 Nordwalde,
☎ 0049 2573 / 626,
✉ fischru@uni-muenster.de

Usono 30 USD
Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton
al la peranto: Jerald T. Veit, 3578 S.
Taylor, Milwaukee, WI 53207
✉ jeraldveit@yahoo.com